

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono
 N° 141 - 2a kvaronjaro 1997 - Jarabono : 35 F al

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP 956-28P Montpellier

Dans quelques jours, le 82° Congrès Universel d'Espéranto se déroulera aux antipodes, en Australie.. Dans un peu plus d'un an, il se tiendra chez nous puis dans deux ans à Berlin. Pour l'an 2000, Tel-Aviv et Zagreb sont sur les rangs.

Après les congrès de Figueres et de Stuttgart (voir p.4,5,6) et les vacances d'été qui nous permettront de faire le plein d'énergie, des rendez-vous sont pris pour Septembre. Voici les premiers connus :

- 8-15 Septembre : semaine internationale de Sète
- 13 Septembre : Foire des Associations sur les Allées de Béziers
- 14 Septembre : Foire des Associations à Montpellier
- 27 Septembre : Réunion fédérale à Béziers.

L'évènement de ces dernières semaines (en Espérantie) a été la parution d'un CD Rom sur l'espéranto. Un document actuel pour s'informer et informer. Informi kaj varbi, ankaŭ dum somero !

Agrablajn somerferiojn !



Jam pretas la aliĝiloj por la kongreso de "Montpeliero". Francio estas en la kategorio A, la kotizoj estas indikitaj en guldenoj (1 guldeno = 3 FF). Aliĝu frue ! Tiel vi ŝparas monon !

ALIĜILO

MONTPELIERO

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 97 12 31 1-a periodo		ĝis 98 03 31 2-a periodo		ekde 98 04 01 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
Aliĝkategorio						
1. ne individua membro de UEA	280	212	350	265	420	318
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	225	170	280	212	340	255
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	170	128	212	160	255	192
4. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	112	85	140	106	168	128

espeRom

JEN LA UNUA ESPERANTA
 KOMPAKTDISKO-ROMO

Oni povas aŭdi 6 horojn da muziko kaj 12 horojn da teksto, vidi etajn filmojn kaj informiĝi pri Esperanto. Enhavo: la lingvo, kursoj, gramatiko, vortaroj, muziko, radio, organizaĵoj, eventoj, gazetoj, legaĵoj, biblioteko kaj libroservoj, Biblio, Internet...
Oni bezonas: minimume komputilon 486/66 kun Windows 3.x aŭ Win 95, SoundBlaster-kongruan sonkarton kaj kompreneble CD-ROM legilon.

Detaloj p. 10.



BEZIERS

Staĝo

Fine de majo la staĝo en Batipaume funkciis kun 32 homoj. La etoso estis tre gaja kaj la laboro fruktodona. La 2a- kaj triagradaj kursoj (S-inoj Turbillon kaj Vincent) estis la plej vizitataj kaj la etoso tre vigla. La kelkaj komencantoj laboris bone dank'al la afabla gvidado de S-ino Bernard. Ni esperas, ke ili daŭrigos sian studadon. Unu tago estis dediĉita al ekskursoj. Kelkaj vizitis la abatejon de Fontfroide, aliaj Carcassonne, kaj aliaj preferis manĝi ostrojn en Bouzigues ! La ceteraj restis en Agde por ripozo kaj babilado en esperanto. Ĉiutage posttagmeze akvarelo altiris venontajn artistojn. La neatendita balotado iom ĝenis la finon de la staĝo, kvankam ni sendis al ĉiuj atestilon por prokurade voĉdoni; sed kelkaj, feliĉe ne multaj, ne trovis anstataŭanton kaj foriris iom pli frue. Ĉe la staĝofino kelkaj kuraĝuloj ekzameniĝis. La vesperoj kun lumbildoj, skeĉoj, ludoj plaĉis al ĉiuj. Ni esperas, ke la venonta staĝo estos tiel bona kiel tiu lasta. Ni antaŭvidas novan staĝon en **98, de la 3a ĝis la 10a de junio**. Ni antaŭrezervis en Batipaume. Jam de nun, notu la datojn (post Pentekosto) kaj rezervu tiujn tagojn por esperanto.

Kunvenoj

La lastan kunvenon antaŭ somero ni dediĉis al la organizo de la aŭtunaj agadoj.

La "Aleoj de Asocioj" (forumo) okazos sabaton la 13an de septembro sur la promenejo Aleoj Paul Riquet.

Krom la kutimaj prezentoj de esperanto, ni intencas insisti pri la UK en Montpellier kaj varbi pli facile intere-

-satojn. La monataj kunvenoj okazos : la 20an de septembro (organizo de la kursoj), 11an de oktobro,

8an de novembro kaj 13an de decembro (Zamenhof tago).

Kursoj

Agemaj membroj de C.B.E. intencas starigi kurson en Creissan, alian en Pézenas (precipe ekinteresiĝo al E-o, post prelego de T. Saladin la 19an de septembro en Pézenas). Kompreneble ankaŭ la kutimaj kursoj en Béziers plu funkcios.

Gratulojn al la grupo de Béziers pro la sukcesa staĝo de Batipaume, pro la plano por 98, ankaŭ pro la intenco starigi aliajn kursojn. Bonan sukceson al la iniciatoj !

Lastminute

Sekve de la lasta baloto, grupanoj decidis skribi al Ségolène Royal kaj Claude Allègre (Ministerio pri edukado) al S-ino C.Lazerge, S-roj A. Barrau, G.Frêche, F.Liberti, B. Nayral, G. Roseau, G. Saumade (deputitoj de departemento Hérault) pri la konstruado de Eŭropo kun la propono enkonduki esperanton en la edukan sistemon. La kompleta teksto estas ricevebla de CBE 9,Rue G. Picot 34500 Béziers. Niaj samideanoj proponas al la grupoj de la federacio, ankaŭ al izolitaj esperantistoj, fari same (skribi al la deputitoj de sia departemento), menciigi la kongreson de Montpellier, la nunajn kaj antaŭvideblajn problemojn en Eŭropo.

MONTPELLIER

Monataj kunvenoj : En Aprilo ĉeestis 3 personoj. Ni parolis dum iom pli ol unu horo pri diversaj naciaj lingvoj (germana, pola, finna, franca, kaj ankaŭ pri esperanto).

Maja kunveno : 9 geĉeestintoj. Nur unu nenion diris, sed oni devas senkulpigi lin. Temas pri Johano, filo de Robert kaj Sophie Latapy, kiu estas ĉirkaŭ sepmonata.

Junia kunveno : 7 geĉeestintoj, kiuj traktis multajn temojn :

- a) Okaze de kvartala Montpelliera festo en "Boutonnet", la 28an de Junio, de la 9a ĝis la 13a horo, Esperanto havos budon kaj informfolioj pri la lingvo, la movado, la kursoj kaj la venontaj kongresoj estos disdonataj
- b) Sama afero en ĉiesdomo "l'Escoutaire" la 8an de Junio.
- c) Ekspozicio pri esperanto okazos dum kelkaj tagoj, antaŭ venonta prelego de André Cherpillod en ĉiesdomo Marcel Pagnol, la 17an de Oktobro 1997.
- c) Loka esperantisto Marcel Bonafé, pere de Yvette Vierne, proponas, ke nia grupo aliĝos al "Maison des Tiers Mondes" por pli facile varbi, disponi pri salono kaj apudigi samspecajn asociojn. La afero estas interesa tamen ĝi ne havas nur avantaĝojn, kaj ni devas atendi ĝeneralan kunvenon por diskuti kaj decidi.
- d) La venonta internacia esperanto-semajno en Sète (la 23a) okazos de la 8a ĝis la 15a de septembro 1997. Jam 26 homoj aliĝis.
- e) Nia monata kunveno komenciĝas je la 18a horo. Pro tio, kelkaj homoj, plejparte junuloj, ne povas partopreni. Tial, kial ne kunveniĝi ĉiujn en kamparo, aŭ en ĝardeno ? Yvette Vierne telefonas al Jeanne Bès, kiu jam akceptis kaj gastigis nin. Nun estas tro malfrue por junio sed ni povus provi en septembro, fine de tiu monato.
- f) Ges. Bouman el Gent (Belgio), kiuj ĵus partoprenis en la staĝo de Agde, ĉeestis kaj prezentis al ni moderanan didaktikan panelon pri esperanto, taŭgan ekzemple dum foiro de asocioj. Ne temas pri kurso sed pri ekzemploj de facileco kaj logikeco por rapide allogi homojn.

PERPIGNAN

La 14an de Junio okazis granda evento en la loka esperanta vivo. Nia amikino Ana Szasz edziniĝis. Ŝi nun havas francan naciecon sed daŭrigas sian esperantan agadon kun sia pola edzo Suavek Jerzy.

Ni tutkore deziras longan kunvivadon.

"Sudfrancia Stelo" plezure aldonas siajn bondezirojn de feliĉo al la nova internacia paro.

La 17an de Junio kvin gelernantoj trapasis la unuan ekzamenon de esperanto.

TULUZO

Dekstre reproduktita de la afiŝoj kaj flugfolioj pri la forumo de la lingvoj okazinta en Majo kadre de la "Prima de las lengas". Radio France International dum sia franclingva programo "Migrations" de la 29a de Majo disaŭdidigis intervjuojn faritajn dum la "Printempo", inter aliaj de René Centassi, kunaŭtoro de "L'homme qui a défié Babel" kaj fragmentojn de satelita elsendo en esperanto de Pola Radio kaj de la 2a volumo de Vinilkosmo-Kompil. La 27an de Junio en la sama programo RFI pritraktis esperanton. Se vi aŭskultis tiun elsendon, bonvolu raporteti!

PROVENC

La najbara federacio informas pri la **Rodana Rendezuo** en Avinjono la 4an kaj 5an de Oktobro. Georges Lagrange gvidos la triagradan kurson (Informoj ĉe 04 90 67 39 31).

Aŭtuna staĝo estas antaŭvidita en Antibes la 8an kaj 9an de Novembro (Informoj ĉe 04 92 34 23 93).

De la 22a ĝis la 24a de Julio posttagmeze la grupo de Gap antaŭvidas publikan surstratan standon (R. Colney BP126 05400 Gap Cedex).

Kaj kiel jam anoncite gejunuloj renkontiĝos en St Raphaël la unuan semajnon de Aŭgusto, post la kongreso en Italio. (Informoj ĉe tel/fakso 04 72 36 07 14).

Bonan sukceson al la diversaj aranĝoj!

KATALUNIO

En la lastaj numeroj ni anoncis detale la staĝojn en nia federacio (Batipaume/Agde, Le Lazaret/Sète), ankaŭ aliloke (Grésillon, La Kvintetalo). Ĉiŝoje ni informas pri la oktobra "Semajno" - jam la kvina - de Sant Carles de la Rapita, 80 kilometrojn sude de Tarragona, en Katalunio (4-11X)

FORUM DES LANGUES DU MONDE



DIMANCHE 18 MAI 1997
(DIMENJADE DE PENTECÔTE)
PLAÇA DEL CAPITOLI, TOLOSA.

PRIMA de las LENGAS

SANT CARLES DE LA RAPITA

Sant Carles de la Ràpita estas mediteranea urbo protektata de la "Golfo de la Alfacs". Ĝi estas unu el la urboj plej aktivaj de la "Marbordo de rivero Ebro". Plena de vidindaĵoj, tre malsimilaj, Sant Carles de la Ràpita distingiĝas per multaj aliaj aspektoj.

Nia golfo estas adekvata loko por la praktikado de la akvaj sportoj. Meze de tranĉvilaj akvoj, facile oni povas atingi la Mediteranean maron, el kiu ĉiutage niaj fiŝkaptistoj eltiras la plej bongustajn krustacojn, kies famo estas konata ĉie.

Trairante la marbordon laŭlonge de la golfo, oni povas konstati la tranĉvilan kaj zorgeman laboron, fare de nia kamaleona "Delto de la Ebro", patro de la "Nacia Parko", la plej grava el Katalunio, kie la bestaro kaj la flauŝo miksiĝis en perfekte harmonio, eksplodigante la sovaĝan forton de la vivo, kiu sprucas el siaj interno, indiferenta al la rigardo de la vizitantoj. La "Nacia Parko" estas ĉirkaŭita per hektaroj kaj hektaroj da riĉaj rizkampoj.

Se oni rigardas malantaŭen, ni vidas la Montsia-montaron, kie troviĝas multaj vojetoj, tra kiuj estas eble viziti, fontojn, kavernojn, pentraĵojn sur rokoj de granda beleco.

Maro kaj montaro, Delto kaj rivero, de tie devenas la gento de la Ràpita, tio ĉi estas, kion nia tero povas oferi al vi. Ligitaj inter si, la pasinteco kaj la estonteco troviĝas la hodiaŭo, kie ĉiu havas sian lokon.

La Ràpita troviĝas en loko de geografiaj kontrastoj. La Mediteraneo donas al nia urbo tiun plezuron de la maro kaj ĉiam kun la agrabila influo de la golfo de la Alfacs. Tio liveras al niaj strandoj specialan allogon, krom la mudeco de la akvoj kaj ĝiaj adekvataj profundecoj, ŝajnas kvazaŭ la tero volus eviti la invadon de la maraj akvoj per la bariero de la montaro Montsia.

JEN LA "ESPERANTO-SEMAJNO"

La celo de ĉi tiu Esperanto-evento, unika en Hispanujo, estas sperti la Esperantan etoson, kvazaŭ en familia rondo.

Dediĉi parton de la tempo al la kulturo estas unu el ĝiaj taskoj. Pro tio, ni ĉiam programas diversajn prelegojn. (Se al vi plaĉas prelegi, volu indiki tion al ni), kies temoj estas libere elektitaj. Starigo de debatoj pri la nuna situacio de la Esperanto-movado neniam estas forgesita. Analizado de la nuntempa Esperanto, ĉiam estas konvena, por ĝusta diskonigo de nia movado.

Alia grava parto de niaj "Semajnoj" estas la ekskursado. Tri aŭ kvar ekskursoj ĉiam estas enprogramitaj. Ni vizitas la plej allogajn angulojn, ĉu en la proksimeco, ĉu ne tiom proksimaj, precipe dum la tutataga ekskurso.

Amuzajloj ankaŭ troviĝas dispone de niaj "semajnoj", precipe post vespermanĝo. Ĉu la jamaj ĉeestintoj, povos iam forgesi la kantadon de "Havanoj" kaj la trinkadon de flamigita rumo? Ni pensas, ke ne!

Ni ĉiam klopodas por ke en la "Semajno" regu veraj amikecoj. Por ke en la menso de la ĉeestantoj restu por ĉiam, la helaj tagoj travivitaj kun aliaj gesamideanoj.

Niaj "Semajnoj" ĉiam okazas en pitoreskaj urbetoj apud la lazura Mediteranea maro, kie malgraŭ la nesomera sezono, ankoraŭ oni povas ĝui la karesemon de ĝiaj akvoj.

Kaj vi karaj eksterlandanoj, kiujn ni speciale invitas, ankaŭ havos la plezuron vivi, kunvivi kun ĉi tiu popolo de Katalunio, kiu tiom batalis kaj batalas por Esperanto kaj por aliaj aspektoj de la ĉiutaga vivo.

En ĉi tiuj "Semajnoj" vi ne estos ĝenata de projektoj, budĝetoj, kaj diskutoj, kiuj tiom abundas en kongreso. Vi venas ĉi tie ripizi, kunvivi kun aliaj esperantistoj, koni novajn gentojn, fine riĉigi ankaŭ vian propran kulturon.

KVINA INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO POR LA KULTURO KAJ TURISMO
(sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo)

Aligkondiĉoj

Restado kun kompleta pensio en hotelo "Aparthotel LA RAPITA" (****)

Aligo al la "Semajno" (kostas Ĝejunuloj ĝis 20 jaroj, senpage)	3 500 peseton
Ŝanĝo dultre	4 200 peseton
Ŝanĝo unultre	5 500 peseton

Mi sendas kiel aligon... peseton, por restado en hotelo dum... tagoj

entute... peseton, aŭ kiel anticipon... peseton

Nomo kaj familiaj nomoj... peseton

Kompleta adreso... peseton

Tel... peseton

Volu pagi al la jera konto: "Caja de Pensiones" N° 2100-3028-25-2200290294, aŭ per poŝta giro al "Internacia Esperanto-Semajno", Font Nova, 32-08202 SABADELL Hispanujo. Tel: (93) 7275021

REZOLUCIO DE LA 28a KATALUNA kaj 1a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Kunvenintaj en Figueres de la 1a ĝis la 4a de majo, la gekongresanoj de la 28a Kataluna kaj 1a Transpirenea Kongreso de Esperanto,
KONSTATAS

-La kreskantan gravecon de la rolo de la Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) (pri evoluo, kulturo, defendo de Rajtoj homaj, civitanaj, lingvaj, etnaj, pri la medio kaj aliaj) en la globala panoramo de la internaciaj rilatoj, kaj ni komprenas kiel NRO-j tiuj organizaĵoj kiuj naskiĝintaj pro la socia volo kaj klopodo, luktas por la starigo de vere nova monda ordo, kiu respektu kaj garantiu la homajn kaj popolajn rajtojn

-La malobeo pli kaj pli maltrankviligan de la plej elementaj rajtoj homaj, civitanaj, lingvaj, etnaj, kulturaj, mediaj, ktp, nepraj por tutmonda kunvivado digna kaj justa

KAJ FARIĜAS PERANTOJ de la justaj postuloj de la NRO-j partoprenantaj en la Kongreso :

-Tiuj pri pacaj movadoj, kiuj opinias, ke oni devas krei la socie justajn kondiĉojn, por ke la paco firme enradikiĝu

-Tiuj pri evoluo kaj justa komerco, kiuj manifestas sian maltrankvilon antaŭ la malekvilibroj inter nordo kaj sudo, kiujn kreis la regantaj ekonomiaj sistemoj

DENUNCAS

-Ke ankoraŭ nuntempe oni torturas kaj murdas pro kialoj konsciencaj, kulturaj, etnaj, religiaj laŭ seksa inklino, lingvaj, politikaj, antaŭ la pasiveco kaj foje eĉ kunkulpeco de tiuj landoj el la unua mondo

-La blindecon de la regantoj kaj de la institucioj, kiuj gvidas la ekonomiajn internaciajn rilatojn kiel la Monda Banko aŭ la Internacia Monfonduso

-La ambiguan politikon de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio, kiuj laŭdire defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj siaj civitanoj, kio tamen ne konkretiĝas en realaj leĝoj por la defendo kaj promocio de la minoritataj lingvoj

APOGAS la alternativojn kaj proponojn, kiujn starigas NRO-j, ĉar konstatablas, ke tiuj organizaĵoj pli efike kaj fidele ol la ŝtatoj, povas atingi la realigon de tiuj celoj

PETAS al la ĝenerala publiko kaj ĉefe al la geesperantistoj, ke ili apogu la NRO-jn kaj aktive partoprenu en ĝiaj agadoj

ankaŭ **PERAS** la proponojn de kelkaj NRO-j en la senco ke la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel interrilata rimedo inter ĉiuj homoj kaj popoloj povas faciligi la demokratiĝon de la lingvaj internaciaj rilatoj.

Figueres,
la 4an de majo 1997

...l'esperanto



LA LANGUE DE L'AMITIE
SANS FRONTIERES

El kongrés de l'idioma més fàcil del món, l'Esperanto, es fa a Figueres

L'Esperanto es promoció com l'idioma més fàcil del món i per a difondre'l, la Festa Major de Figueres acull el 28è Congrés de l'Associació Catalana d'Esperanto i, al mateix temps, el primer Congrés Transpireneu d'Esperanto.

Detallem primer la programació dels actes i, després, recollim el que significa aquest idioma a l'actualitat.

El dijous 1 de maig, aquest congrés d'inaugura a les quatre de la tarda, al saló de sessions de l'Ajuntament. I, a les nou del vespre, la sala gran del Casino Menestral Figuerenc acollirà l'actuació de ball-folk del grup occità Aigarella.

El divendres, dia 2, Ramon Carmona s'encarregarà de conduir el curset de ball-folk, al casino, a partir de les dotze del migdia. L'endemà, el gran 3 de maig, nova sessió del curset a la mateixa hora i indret.

Amb aquestes activitats, els organitzadors han pretès que Figueres prengui un tarannà més europeu, ja que està prevista la visita d'esperantistes d'arreu del món.

A la nostra ciutat, l'esperantisme no ha arribat a quallar, tot i que té certes arrels històriques i importants. Una dada: un dels promotors de l'esperantisme a Figueres va ser el notari Salvador Dalí, qui el 1904 va contactar amb persones de Ceret i van crear "L'Aplech Esperantista de Ca-

talunya", i va impulsar l'edició d'un butlletí d'aquesta associació que es repartia per l'Empordà i el Rosselló. Més tard, el figuerenc Delfí Dalmau, va ser un altre gran promotor d'aquest moviment, arribant a la presidència de la Federació Catalana d'Esperanto i va ser vital per a la secció

d'Esperanto del Club d'Amics de l'Esperanto del Club d'Amics de la Unesco, a Barcelona. Precisament, una de les activitats del congrés que es preveu que se celebri per Fires, és l'homenatge a Delfí Dalmau. Un dels temes principals de les xerrades, en aquestes dates, és la relació internacional amb les organitzacions no governamentals.

L'Esperanto, la llengua universal, va ser creada pel doctor de Polònia Lluís L. Zamenhof, arran d'una síntesi dels idiomes del planeta pel qual resava que l'Esperanto no només era estudiar unes normes sintàctiques, semàntiques i fonals, sinó que

neixia sota la convicció que es tractava d'una missió de germanor entre tots els habitants del món, a banda de races i creences. En definitiva, una llengua comuna per a tothom, amb rasgues de totes les existents.

L'Esperanto va ser practicat per personalitats com Tolstoi, Eugeni d'Ors, Mao Ze Dong i Pi i Margall.

Actualment, s'editen un bon nombre de revistes i periòdics a totes les organitzacions esperantistes del món. A més, existeixen traduccions a l'esperanto de les grans obres literàries de la història, tant en narrativa com en poesia.



Congrès "européen" de Stuttgart Résolution adoptée:



Internationalité de l'espéranto

Lorsque nous présentons l'espéranto, nous insistons souvent sur le fait qu'une majorité de racines sont d'origine latine. En réalité, un fort pourcentage des mots en espéranto se retrouve aussi dans les langues germaniques ou slaves, qui sont avec les langues latines les principales composantes des langues européennes. Il serait donc plus juste de présenter l'E° comme une synthèse des langues européennes (au niveau du choix des racines, son système agglutinant le rapprochant aussi d'autres langues).


Le graphique ci-dessous est tiré de "Espéranto actualités" de Mai (supplément de "Franca Esperantisto") et reprend une étude de Jean Marin que nous détaillerons volontiers pour nos lecteurs, si le sujet les intéresse.

Le vocabulaire de l'espéranto

Le vocabulaire de l'espéranto est composé de

- 93 % de racines latines
- 89 % de racines germaniques
- 43 % de racines slaves

Il est évident qu'un grand nombre de ces racines se recoupent, comme le montre le graphique suivant:



Résolution du Comité de l'Union Européenne d'Esperanto (E.E.U.)

Les espérantophones des pays de l'Union Européenne réunis à Stuttgart durant le 3ème Congrès d'Esperanto de l'Union Européenne du 16 au 19 mai 1997,

CONSCIENTS

- que les peuples européens, après les sanglants conflits et les millions de victimes, ont accédé, après la 2^o guerre mondiale, à une cohabitation pacifique dans des institutions démocratiques communes;
- que l'Union Européenne constitue la démonstration concrète de la nécessité de construire de telles institutions;
- que l'avenir de la paix et de la prospérité européenne est inévitablement lié au succès de cette démonstration;

ET, en outre, CONSCIENTS

- que le continent européen est la partie du monde où le problème linguistique a la plus grande importance et la plus extrême urgence;
- que l'absence d'une solution démocratique au problème de la communication humaine directe entre les citoyens européens constitue une énorme entrave à la progression de la construction européenne;

DECLARENT

- que la diversité des cultures, des idées et des langues est une grande richesse mais à la condition expresse qu'elle soit accompagnée de principes de base communs, de respect des droits fondamentaux de l'homme et d'une possibilité effective d'intercommunication égale pour tous;
- que l'étude de la langue planifiée internationale esperanto, suivie de la possibilité d'étudier une ou plusieurs langues ethniques, est la voie la plus appropriée pour atteindre une communication égale pour tous avec une connaissance réciproque plus profonde;

ATTIRENT L'ATTENTION

des instances de l'Union Européenne, des gouvernements nationaux et de l'opinion publique sur la possibilité qu'offre le Mouvement Esperantiste selon le "Manifeste" de ce mouvement présenté à Prague en juillet 1996

CONFIENT

à l'Union Européenne d'Esperanto la tâche de représenter le mouvement esperantiste devant les instances de l'Union Européenne, de leur présenter les possibilités d'une langue planifiée et de collaborer avec elles, de toutes les manières, afin d'atteindre une meilleure intercommunication entre tous les Européens.

STUTT GART le 18 MAI 1997

Koncize

Kongreso de Figueres (1-4V)

Aliĝis 120 personoj; bebo reprezentis ĉiun el la 3 federacioj (la plej aĝa estis Jasmin' el Sudo-Pirenejo). Vigla etoso en la urbo, ne nur pro la muzeo Dali sed ankaŭ pro la foiro kaj loka festo (ĉu vi jam vidis 6-etaĝan homan piramidon?) Riĉa programo en la kongre-sejo kaj amika etoso kiel kutime. Jen kelkaj progra-meroj: Kurso pri tradiciaj dancoj, koncerto de Jomo kaj la Mamutoj, de la muzikgrupo Aigarella; inicado al Internet, urbovizito; prelegoj en la kataluna kaj en esperanto: fonetiko, literaturo, NROj (neregis-taraj organizaĵoj) kiel Amnestio Internacia, UEA kaj NROj, Ikel, Acat, Civitanoj de la Mondo, Monda Fonduso de solidareco kontraŭ la malsato. Ankaŭ aldonindas prezento de la UK de Montpellier (B. Legeay/J. Hénin) kaj omaĝo al pioniro Delfi Dalmau. Malpravus tiuj, kiuj ne ĉeestis!

Federacia kunveno

Kadre de tiu kongreso kunvenis aparte la Kataluna Asocio, "Sudo-Pirenejo" kie oni provas fondi iun strukturon kaj nia federacio. Ĉeestis nian kunvenon nur deko da personoj (kelkaj homoj venis al Figueres ... por turismi!). Ne eblas decidi kun tiom malmulte da partoprenantoj. Ĉu kulpas la datoj, la distanco, ia dubemo, la timo de elspezoj, malinteresiĝo? Multaj komitatanoj eĉ ne informis pri malĉeesto! Ĉu starigi sistemon de "povodonoj" kiel ĉe UFE? Se esperantistoj ne estas koncernataj de la E°-vivo en nia regiono, ni malfondu la federacion!

Ĉar nia sekretario Jeannine Bony demisiis, Charles Gérard, nia ekssekretario, konsentis anstataŭi ŝin. Dankojn al ambaŭ pro la farita kaj farota laboroj!

Aŭtuna kunveno

Ni kunvenos en Béziers sabaton **27^{an} de Septembro** (ekde la 10a horo en la Domo de Asocio) kaj pridis-kutos la bezonon kaj la celojn de federacio. Ĉiuj respondecaj esperantistoj estas kore invitataj. Ne estas la momento rezigni, kiam alproksimiĝas la Universala Kongreso de Montpellier!

La fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon vous invite à participer à la réunion qui aura lieu le samedi 27 Septembre à Béziers (à partir de 10 heures à la Maison des Associations) pour redéfinir les buts de la fédération, à la veille du Congrès Mondial de 98 dans notre région. Bienvenue à tous!

Esperanto estas ĉies afero
L'Espéranto, l'affaire de tout un chacun

Enketo kaj speciala tarifo

Esperanto-France (UFE) provas listigi la kursojn kaj staĝojn, kiuj okazis ĉijare aŭ okazos venontjare. Eĉ se vi ne estas iel ligita al UFE, bonvolu respondi, por ke plej kompleta listo estu je ĉies dispono.

Se necese, petu enketilojn de SFS. Same, se via grupo deziras raporti por la septembra numero de "Franca Esperantisto" do naciakale pri

la okazintaĵoj aŭ okazontaĵoj (ekzemple por la agotago de la 4a de Oktobro), petu la enketilon. UFE proponas kiel ĉiujare en tiu sezono apartajn kondiĉojn por la mendo de iuj libroj kaj broŝuroj. Aldone al speciala tarifo tutescepte ne estas sendo-kostoj. Profitu la okazon k. petu mendilon al SFS!

Eŭropunia Kongreso en Stuttgart 16-19V

Ĝi sekvis kulturalan semajnon en Aalen. La kongresa libro listigis 359 aliĝojn el 21 landoj (surloke aliĝis kelkaj pliaj homoj): 169 el Germanio, 57 el Francio, 38 el Italio, 23 el Rusio, ktp, do la etoso estis vere internacia. La kongreso estis bone organizita, eĉ se kelkfoje la kunvensalonoj ne estis facile troveblaj pro lastmomentaj modifoj. La kunvenoj estis altkvalitaj kaj kompreneblaj la temo estis pri la estonteco de Eŭropo ("Eŭropo, kien vi?); partoprenis la viglajn diskutojn du germanaj Eŭrodeputitoj.

Stuttgart estas moderna urbego kun valora historia parto kaj interesaj ĉirkaŭaĵoj. Ĝi estas ankaŭ multe-kosta por la vizitantoj sed tio estas alia afero! La tieaj loĝantoj estas tre afablaj sed ofte parolas la germanan kun forta akcento aŭ uzas la ŝvaban dialekton; du ekzemploj: wi schbäd hëmmers? (la kioma horo estas nun?) kaj i móg di gänz arg! (mi amegas vin). Je la okazo de tiu kongreso naskiĝis la unua laserdis-ko pri esperanto pri kiu temas en tiu n° de SFS. UFE ankaŭ kongresis en tiu kadro; L. Ensuque kaj A. Tora deĵoris ĉe budo pri la UK kaj prezentis ĝin per vidbendo.

La venonta Eŭropunia kongreso okazos marborde en Oostende (Flandra Belgio) en Majo 2000; la programo estas jam preta (!) kaj estis disdonita dum la kongreso. Inter aliaj estos kolokvo en la Eŭropa Parlamento de Bruselo "Dialogo kun la Eŭropa Civitano" kaj varia

turisma programo. Jam notu la datojn: Pentekosto 2000 (20-24 V). Oostende estas facile atingebla (per rapidtrajno TGV) aŭ aŭtoŝoseo kaj se la Norda Maro ne bluas kiel la Mediteraneo, ĝi estas ankaŭ vidinda. Ĉajnas, ke por la jaro 2003 Barcelono havas bonajn ŝancojn, se ĝi restas kandidato.

Sondado

"Provence Esperanto" sendis 245 enketilojn kaj ricevis 20 respondojn! 60% de la responditoj interesiĝas pri E° pro idealo kaj 80% restas interesitaj (inter ili 45% entuziasmaj). La plimulto de la respondintoj dezirus "pli da bruo ĉirkaŭ esperanto" sed kiel eblus tio kun tiom magraj trupoj?

En nia federacio ne estas pli bone. Sondo de opinioj lastjare rezultigis saman proporcion de respondoj, do la rezultoj ne estis vere konsiderindaj, despli ke la respondoj estis kontraŭdiraj. Tio da kapoj, tio da opinioj! Novaperinta leginda libro elektis la titolon: "E°vivos malgraŭ la esperantistoj". Ĉu pesimismo?





MONTPELLIER


URBO DE LA 83^a UK



Jen la promenejo "Esplanade",
fotita dum somero, kiam oni ĝuas la ombbron de ĝiaj platanoj.
Ĉe la fino de la promenejo, troviĝas "Corum".
Moderna konstruaĵo, inaugurita je 17 / 12 / 1988, konceptita de la arkitekto
Vasconi, ĝi entenas la operejon Berlioz - ĉefverkon pri akustika tekniko.
En 1998, ĝi estos via Kongresejo !
Corum situas centre de la urbo, proksime al la historiaj kvartaloj, kun agra-
blaj ĝardenoj, multnombraj restoracioj, diversprezaj hoteloj (1000 ĉambroj je
malpli ol 10 minutoj piede).

Vidindaĵoj de Montpellier

- Du promenejoj de la XVIIa jarcento : Le Peyrou, sufiĉe alta por ĝui belan pejzaĝon ; Esplanade, kiu freŝe, dank' al platanoj kaj ŝprucofontanoj, kondukas nin al Corum, la kongresejo.
- Du ĝardenoj : la botanika, fondita fine de la 16-a jarcento de la reĝo Henrika la IVa ; la zoologia fondita antaŭ kelkaj jardekoj, kie la plimulto el la bestoj vivas meze de "garigo", tipa mediteranea pejzaĝo.
- Katedralo kaj Medicina Fakultato - mezepokaj - vi jam konas ilin dank' al la afiŝo anoncanta la 83a UK-n.
- Domegoj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj, apud la placo de la Ovo (tiel nomita pro ĝia formo) kaj la malnova teatro.
- Muzeoj kun trezoroj i. a. pentraĵoj de Delacroix, Courbet, Bazille.
- La novaj kvartaloj : komerca Polygone, Antigone konceptita de la arkitekto R. Bofill kaj baldaŭ haveno Marianne, kiu kunligos Montpellieron al Mediteranea Maro.



Regionaj vidindaĵoj :

- Naturaj : sablaj strandoj, kavernoj (Demoiselles, Clamouse...), pireneaj montaroj aŭ vastaj ebenajoj de Petite Camargue...
- Artaj, arkitekturaj :
 - de la greka epoko : efebo d' Agde
 - de la romia epoko : amfiteatroj de Nîmes, Arles ...
 - de la mezepoko : kataristaj kasteloj, citadelo de Carcassonne, abatejoj de St-Guilhem-le-Désert, Fonfroide, katedraloj de Béziers, Maguelone...
 - de la klasika epoko : multnombraj domegoj en Montpellier, Béziers, Uzès, Perpignan...
 - de la nuntempa epoko : la piramidoj de La Grande-Motte...
- Teknikaj : la Suda Kanalo lastatempe projektita de UNESKO, same kiel Pont du Gard...




Por ĉiuj informoj, bonvolu telefoni al
33(0)4 67 54 15 43 aŭ faksi al
33(0)4 67 58 79 61

UK-98

(El "Eventoj")

Eĉ la ĉi-jara UK ankoraŭ ne komenciĝis, sed jam intense laboras ankaŭ la preparkomitato por la sek-vajara kongreso en Montpellier, Francio.



Estas ĵus eldonitaj grandformata kolora afiŝo kaj glumarko, propagandantaj la kongreson.

Pri ĉiuj demandoj LKK estas kontaktable ĉe:

LKK, 7 rue Gustave,
FR-34000 Montpellier, Francio

Vidpunkto : Eŭro-esperanto !

Molière, unu el la plej fekundaj francaj verkistoj, igis fama S-ron Jourdain (Jurden), ĉar li "faris" prozon ne sciante tion.

Ĉu niaj nuntempaj "Eŭrokratoj", kies tasko estas konstrui Eŭropon, restos tiel famaj en estonto, ĉar ili kvazaŭ praktikas Esperanton, ne sciante tion? Dubinde!

Certe ĉiuj el ili scias, kio estas Esperanto laŭnome, sed ne pli ol nome. Ili tute ne scias pri ĝiaj ĉefaj bazoj, kaj tute ne konas la kaŭzojn, kiuj ebligis al tiu lingvoprojekto pluvivi pli ol unu jarcenton kaj fariĝi vivanta lingvo en tre malfavoraj cirkonstancoj, dum aliaj projektoj apenaŭ eliĝis el la cerbo de la konceptintoj.

Tiel kelkaj el tiuj Eŭrokratoj kunvenintaj en Madrido decidis, ke la estonta Eŭropa mono havos nomon "EURO", sendube ne nur por plaĉi al la francoj, kiuj juĝis, ke la nomo de la monunujo antaŭe projektita portos la nomon "ECU" (EKŬ), kiu maldece sonoras al iliaj oreloj. Tute certe estas ke inter ili neniu sciis ke, adoptante la vorton "EURO", ili samtempe respondas jese al la dua el la 16 reguloj de la Esperanto-Fundamento. Verŝajne tiu nomo plaĉis al ili pro sia klareco, koncizo de bona sonado.

Restas nun la dua fazo de la ekpraktikado, kiu evidente estas la plej grava! Eldono de moneroj kaj biletoj, fiksado de kiel eble plej ĝusta valoro inter la diversaj Eŭropaj kaj ekstereŭropaj monoj kaj ekagado praktika por la aplikado de la sistemo. Tio koncernas la ekonomiistojn kaj financistojn kaj ne multe rilatas al esperanto. Tamen eldono de moneroj kaj biletoj kun iliaj surskriboj ne povas lasi la esperantistojn indiferentaj. Nun, meze de l'jaro 1997, oni ne klare scias, kiel oni povos distingi la diversajn pagilojn. Tamen oni scias, ke koncerne la metalajn monerojn, unu faco prezentos la valoron per cifero (universala rekonilo) kaj la alia faco prezentos tekston lakonan en la lingvo de la lando de la emisia banko.

Per tiu dufaca prezento oni ja retrovas la esencajn trajtojn de komuna interŝanĝilo ĉu mona, ĉu idea, ĉar precize tie estas la fundamentaj kriterioj de la neutrala lingvo Esperanto: paralela uzado kaj respekto de ĉiuj etnaj lingvoj, ĉu oficialaj, ĉu minoritataj, kvankam pri mono tiu privilegio ne povos bedaŭrinde esti agnoskita por tiuj lastaj lingvoj.

Tiu baza karaktero, kiu ebligas al ĉiuj lingvoj konservi siajn proprajn specifojn estas gravega punkto, ĉar la ekskluziva uzado de iu ajn etna lingvo implicate trudus la superecon de unu lando kun la gravaj misinfluoj, kiujn ĝi kunportas kvazaŭ origina peko!

R. Colney (Gap)

P.S. Memorinda estas la fakto, ke la Svisoj konservas sur siaj bankbiletoj la indikojn en la Romanĉa (oficiala lingvo).

APPEL DES ESPERANTISTES
 POUR UNE MONNAIE UNIQUE EN EUROPE

Eŭropanoj!

1. Salte al tio: kreado de Eŭropa Unio.
2. Ĉe landaj balotoj voĉdonu nur je la favoro de tiu partio, kiu batalas por kreado de unueca ekonomia teritorio eŭropa.
3. Propagandu kreadon de Komuna Parlamento de Eŭropaj naciaj parlamentoj.
4. Postulu starigon de komuna Eŭropa Armeo kaj la enkondukon de unueca Eŭropa Valuto.
5. Postulu aŭtonomiojn por la ŝtatoj, provincoj kaj urboj en Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo.
6. Lermu „eŭrope“.
7. Respektu ankaŭ la naciecon de aliaj.
8. Batalu por la malburokratigo (malŝtatigo kaj malmonopoligo) de l' ekonomio.
9. Batalu por leĝoj kaj institucioj, kiuj ebligas liberan socian kreskadon, do naturan klaso-ŝanĝon.
10. Kiu batalas por Eŭropa-Unuiĝo, akcelas la mond-pacon.

Eldonis: USE-EFO, Timișoara, Str. Lovici 1 (Rumanio-Banato).

POSTKARTO

13 SEP 97

Sen René de La Jarre

4, Villa de Orleans

Fontenay-sous-Bois

(Seine) - FRANCIA

Traduction:

Européens!

1. Malgré tout, croyez en une union européenne.
2. Lors d'élections nationales, votez seulement pour un parti qui milite en faveur de la création d'une zone économique européenne unifiée.
3. Propagez l'idée de la création d'un parlement commun des parlements nationaux européens.
4. Réclamez la constitution d'une armée commune européenne, ainsi que l'introduction d'une monnaie européenne unique.
5. Réclamez l'autonomie pour les Etats, les provinces et les villes au sein des Etats-Unis d'Europe.
6. Etudiez "européen".
7. Respectez aussi la nationalité des autres.
8. Lutte contre la bureaucratisation (dénationalisation et démonopolisation).
9. Lutte pour des lois et des institutions qui permettent le libre développement social donc un changement naturel de classe.
10. Celui qui se bat pour l'Union européenne favorise la paix mondiale.

Petite précision de "Sudfrancia Stelo":
 La carte en espéranto ci-dessus a été
 éditée en Roumanie et postée le 13 Sep-
 -tembre... 1934 ! (collection J. Amoureux)
 Une partie du texte au moins n'a rien
 perdu de son actualité...

Post la vizito de Zdravka (SFS 140), iom pri ŝia lando :

BULGARIO MALNOVA KULTURO KUN RIĈA MUZIKO



Bulgario, situata inter rivero Danubo kaj montaro Rodopoj, oriente limigita de la Nigra Maro, kovras grandparte la teritoriojn nomatajn en la antikva tempo Trakio (aŭ: Tracujo), Makedonio kaj Mizio. En la 8a jarcento antaŭ nia erao, Homero mencias la trakojn (tracojn) en sia «Iliado» kaj «Odiseado» kun ties kantisto Orfeo. Famaj estas la traka ceramiko admirebla en bulgaraj muzeoj. La komenco de la urboj Serdica (Sofia), Philippopolis (Plovdiv), Bononia (Vidin), Odessos (Varna), Messembria (Nessebar), Augusta Trajana (Stara Zagora), Sexaginta Prista (Ruse) kaj aliaj datas el la traka, romia kaj bizanca epokoj.

En la 5a jarcento, la turkida tribo de la prabulgaroj penetris la Balkanan Duoninsulon kaj post jarcentoj formos kun la trakoj kaj la slavoj, ekloĝantaj fine de la 6a jarcento en Balkanio, la siavan bulgaran nacion. En la jaro 681, Bizanco agnoskas la novan bulgaran ŝtaton kun la ĉefurbo Pliska. En la 9a jarcento la lando alprenas la kristanan kredon kaj la misiistoj Cirilo kaj Metodo disvastigas la slavan skribon kaj fondas lernejojn en Ohrid kaj Preslav, la novaj bulgaraj ĉefurboj. Sub caro Simeono (893-927) la bulgara literaturo kaj la mezepoka bulgara kulturo prosperas. Per la anekso de Bulgario far Bizanco en 1018 finiĝas la Unua Bulgara Regno kaj sekvas fremda regado dum pli ol 150 jaroj. La Dua Bulgara Regno naskiĝas en la 12a jarcento kun la ĉefurbo Veliko Tarnovo. En siaj muzikaj verkadoj, la bulgaro Joan Kukuze! adoptante elementojn de la bulgara popolkanto famigis la eklezian kantarton en la tiama internacia mondo.

Kiu serĉas la malnovan arton en hodiaŭa Bulgario kaj volas kompari kun la mezepoko de okcidenta Eŭropo, tiu devas konsideri unu fakton: dum 500 jaroj la aŭtentika kulturo sur la bulgara tero estis detruita de la fremda, turka regno. Kio restis konservita, tio estis restaŭrata iom post iom.

Malgraŭ ĉiuj provoj „ŝanĝi“ Bulgarian kaj spite al la krizoj, kiujn minacis la ŝtaton de malapero, ĝi firme pluekzistadis kiel kristana lando, nedisigeble apartenanta al la tuteŭropa kulturo.

La multnombraj turistoj vizitantaj la kulturlandon ĉe la sudorienta rando de Eŭropo trovas ne nur restaĵojn de antikvaj epokoj, sed ankaŭ tre originalecan arkitekturon el la tiel nomata „renesanca“ tempo de la 19a jarcento, ĉarmajn urbojn, impresajn pejzaĝojn, bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj varman akcepton de tradicie gastigema popolo.

La bulgara *muziko* estas fenomeno - ĉu temas pri la okvoĉa eklezia kantarto sen instrumenta akompano, ĉu pri la specifa popolmuziko kaj folkloro, sufiĉe fremda por okcidentaj oreloj, ĉu pri la famaj operkantistoj, kiuj hejmas sur ĉiuj scenejoj de la mondo.

Malgraŭ sia parenceco kun la folkloro de la aliaj balkanaj landoj, la bulgara popolmuziko forte diferenciĝas de la muziko de siaj najbaroj. Necesas distingi la diversajn muzikajn regionojn de Bulgario kun propraj, memstaraj tradicioj kaj karakteroj: Pirin, Trakio, Rodopoj, norda Bulgario, Dobruĝa, Ŝopa regiono. Pirina Makedonio troviĝas en okcidenta Bulgario, Trakio en la sudoriento kaj la rodopa muziko en suda Bulgario famiĝis pro la sakŝalmoj. Norde de la balkana montaro oni renkontas aliajn muziktradiciojn, kaj nelaste oni devas mencii la tre specifan kantarton de la ŝopaj virinoj vivantaj ĉirkaŭ la ĉefurbo Sofio.

Krome, la bulgara popolmuziko specifiĝas laŭ sia enhavo, formo kaj strukturo, melodioj, sonoj, instrumentoj kaj kantmanieroj. Specialan atenton meritas la ritmoj en ĝi - de la plej simpla taktmezuro 2/4 ĝis la tre komplika 15/16 aŭ la longdaŭraj, senmezuraj kantoj. La sonoj formiĝas laringe, naze kaj bruste, sed tamen restas puraj kaj klaraj. En siaj laboraj, dancaj, heroaj, festaj, rikoltaj, lirikaj kaj amkantoj la bulgaroj esprimas siajn revojn, pensojn kaj emociojn kaj respegulas la historian sorton de la popolo. Ofte, la kantado estas akompanata de ŝalmo, gadulko, sakŝalmo, liuto, tamburo, kaj aliaj. Ĉiuj tiuj eroj formas la buntan mozaikon de la unika bulgara popolmuziko. La renkonto kun la fantasta bulgara popolmuziko do surtabligas multajn surprizojn. Ĉar la bulgara popolkanto kutime estas ligita kun la popoldanco, oni ne maltrafu ĉeesti vivantan koncerton, precipe kiam ĝi disvolviĝas en tiom pitoreska muzeurbo kiel Koprivŝtica en centra Bulgario.

La celoj de mia prelego estas havigi imagon pri la malnova kulturo de Bulgario kaj aparte pri ĝia popolmuziko. Per lumbildoj kaj muzikaj ekzemploj mi provas komprenigi al la publiko la priskribitajn fenomenojn kaj esperas baldaŭ bonvenigi la amikojn de Bulgario hejme en mia lando por ĝui la unikan muzikon, etoson kaj kulturon.

Evento de la jaro!

Komputila laserdisko: espeRom

La komputiloj en la lastaj jaroj ŝanĝis nian vivon. Krom la baza utiligo (teksto- kaj bildoprilaboro, datumbazoj, kalkuloj ktp) aperas ĉiam pli da akcesoraj komponeroj, ebligantaj novan utiligon (aŭskultado de radioelsendoj, filmoj, animajoj, ktp. La amasiĝinta materialo estas storata i.a. en komputilaj laserdiskoj, codoromoj. En la vendejoj abundas tiaj diskaj, sed ĝis nun vane ni serĉis Esperantan materialon.

Stefan Fisahn en la Universitato por Biblioteka kaj Informa Scienco en Stuttgart kiel diplomverko devis

produkti codoromon. Kaj se jam produkti, kial ne fari ĝin pri Esperantaj aferoj? Por pretigi la unuan ekzempleron kunlaboris ankaŭ Tilman Meierfrankenfeld el Münster, kaj la eldonadon financis kaj entreprenis Germana Esperanto-Asocio.

La disko "espeRom" estas kolektaĵo de plej diversaj E-materialoj, programoj, tekstoj, sonoj, filmoj kaj legajoj! Ĝi estas farita per HTML-tekniko (la sama kiu estas en la interreto por TTT-paĝoj), do iu ajn povas uzi ĝin sen aparta scio pri komputilaj aferoj. La kompaktdisko ebligas ne nur legi diversajn tekstojn, sed ankaŭ povas montri moviĝantajn filmojn pri E-aranĝoj.



el "Eventoj"



JARLIBRO 97

Ĝi ĵus aperis kun 1950 delegitoj en 90 landoj (kompare kun 1830 en 88 landoj lastjare), 228 en Brazilo (184 en 96), 199 en Germanio (kiel lastjare) kaj 143 en Francio (137 lastjare). La kvara lando laŭnombre estas Japanio kun 94 delegitoj, same kiel lastjare. En nia federacio 2 pliaj delegitoj, tiu de Perpignan (forĝesita lastjare) kaj unu en Peyriac de Mer (11), Annick Tora, al kiu ni deziras bonan sukceson, entute 7 delegitoj. Daŭre mankas delegito en departemento Gard. La leginda dupaĝa antaŭparolo estas de R. Triolle, vicprezidanto de UEA kaj duonpaĝa reklamo estas pri la UK de Montpellier.

aŭskulti muzikon de E-kantistoj, aŭskulti fragmentojn el la E-lingvaj radioelsendoj, do vere estas utila materialo. Kaj ĝi estas nelastvice kiel bonega propagand-materialo! Nepre indas havi ĝin!

Por plene eluzi ĉiujn eblojn de la disko, estas necese havi komputilon PC 486DX66 kun min. 4 MB memoro, 12 MB libera loko sur la durdisko, sonkarto (SoundBlaster-kongrua), CD-ROM-legilo (min. 2x rapido) kaj VGA-monitoro. Komprenible ĝi funkcias ankaŭ sur malpli rapidaj komputiloj, sed ĉi kaze oni devas iom pli atendi por apero de novaj paĝoj kaj eble la filmoj ne havos perfektan sonon.

"EspeRom" estas uzebla laŭ precipe per Windows3x, Windows95, MacOS kaj Unix sistemoj. La disko mem enhavas ĉiujn necesajn programojn, necesan por la utiligo.

Post la startigo ĝi instalas (anglalingvajn) programojn Iviewpro (html-legilo), Quick Times (por filmoj) kaj winplay3 (por sonoj), sed komprenible oni povas uzi la diskon per jam ekzistantaj programoj kiel Netscape aŭ Explorer, ktp.

Por prezenti, kiom vasta estas la surestanta materialo, jen iom da (tute ne plena) listigo de intereso:

- Bildoserio, ekz. kolora foto de Zamenhof
- Programoj, ekz. Supersigno (2.01) makrooj, E-literumilo, la serio PCE1-5 (inkluzive EBEA!)
- Ludoj, ekz. Angela, Aventuro
- E-litertipoj, ekz. serio de Eve-93, pluraj latin-3 tiparoj por DOS kaj Windows
- Gazetoj, ekz. Esperanto-Aktuell, GEJ-gazeto, Eventoj, Monato, Kontakto, Esperanto, La Gazeto, Sennaciulo ktp.
- Plena manlibro de Esperanto-Gramatiko, PMEG

- Interretaj aferoj: retadresaro (97.01.01) kun 1255 adresoj, flavaĵoj, virtuala E-biblioteko, babilkanalo IRC, esp-faq ktp.
- Dokumentoj: Bulonja deklaro, Ekzerco (de Zamenhof), la 16 reguloj, principaro de Frosvallen, Deklaracio de Tiresó, Manifesto de Prago, ktp.
- Organizo: informoj pri UEA, TEJO, GEA, IKEF, SAT, FEL ktp.

espeRom

- Kursoj: Gerda malaperis (sonanta), hispane, germane, ktp.
- Legajoj: la tuta Biblio, fabeloj de Grimm, Glinda de Oz, Muminvoja, poemoj, rakontoj por infanoj ktp.
- Muziko: Jak Le Puil, Turmonda Muziko, Flavio Fonseca, Kajto, Ono Takao ktp.
- Radioelsendoj: programegoj el Kubo, Varsovio, Sarajevo, Vatikano
- Vortaroj: Komputika Leksikono (!), rokterminaro, Terminoteko, ktp.
- Movadaj aferoj: Lingvopolitiko por Esperanto, Informado sen mitoj, Esenco kaj

estonteco de la lingvo internacia (LLZ)

- Filmoj: pri FAME, UK, IS ktp.

Komprenible la kompilado estis subjektiva, kaj dependis ankaŭ de la disponebla materialo, sed certe la enhavo estas ege ampleksa! Pripensu: sur unu disko vi trovas kaj PMEG, kaj Komputika Leksikono, kaj Biblio, kaj EBEA kaj...

Aktualaj novaĵoj pri espeRom estas troveblaj en la interreto ĉe:

<http://machno.hbi-stuttgart.de/~st/esperom/>

Kaj fine: kiel oni povas havigi por si la diskon? Ĝin vendas pluraj libroservoj kaj vi povas ankaŭ mendii ĝin kontraŭ 30 germanaj markoj ĉe la aŭtoro:

Tilman Meierfrankenfeld
Pleistemühlenweg 109,
DE-48155 Münster, Germanio
Tel./Fakso: +49-251-316983
Rete: meierfr@uni-muenster.de

PASPORTA SERVO

La venonta eldono aperos en Januaro 98. La limdato por la gastigantoj estas la 1a de Oktobro. Se vi volas helpi al gejunuloj por vojaĝi pere de esperanto, ne hezitu aldoni vian nomon al la listo de gastigantoj. Vi-mem decidus pri la kondiĉoj de akcepto. Detaloj haveblas de SFS.

Eko per Eco

Mi studis la gramatikon de Eco kaj ties historio. Min fascinis la figuro de Zamenhof. Mi malkovris ke Eco estas ĉefverko, tre bone konstruita. Dum ĉiuj artefaritaj lingvoj emas ŝpari, Eco emas fordoni ekonomion kontraŭ optimumeco: tipa ekzemplo — la akuzativo. Estas ekonomia principo elimini la deklinaciojn tial ke ekzistas la prepozicioj, sed, ĉar en ĉiuj lingvoj kie ekzistas la akuzativo ĝin enkondukas neniu prepozicio, jen montriĝas ambiguo, aparte se oni uzas ĝin latinece por la movo al loko. Oni povas male demonstri ke, enkondukante malŝparan elementon, Zamenhof optimumigas la funkciadon de la sistemo. Temas pri lingvo kiu, finfine, funkcias bone, ĉar elpensita laŭ la modelo de la naturaj kaj ne sur tiu de la filozofiaj, kiuj volas dividi la mondon en multajn partojn.

Al ĉio ĉi oponas la malnova argumento, ke neniu iam kapablis altrudi lingvon: alia argumento, jam diskutita inter Enciclopédie kaj la ideologio, estas tiu de la egotismo de la registaroj: kiu registaro akceptas la cirkuladon de internacia lingvo, se ĉiun registaron avantaĝas la cirkulado de la propra?



Sed hodiaŭ nin frontas du novaĵoj: la unua estas la amaskomunikiloj, iaspeca lingva Akademio ĉiutage, kiu garantias la konservadon de certa normo malgraŭ la diferencoj. Sufiĉas pensi ke ni sukcesis instrui la italan al albanoj kaj tunizianoj danke al Pippo Baudo [sicilia teledividulo], sekve ne estus maleblu instrui E-on al la tuta mondo.

(Heroldo)

Malnova Franca ZEO trovita

La libro de Hugo Röllinger "Monumente pri Esperanto", kiu enlistigas 1044 ZEO-jn en 54 landoj, ĵus aperis, eldonite de UEA. Probable kelkaj laŭlandaj listoj ne estas kompletaj. Certe pluraj, eĉ malnovaj, mankas, restante en ombro, forgesitaj de nunaj esperantistoj. Jen pruvo en Francio, kie malnova ZEO estis trovita, apenaŭ la Röllinger-libro eliris presejon!

En Parizo, de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1932, okazis la 11a Kongreso de Blindaj Esperantistoj. La Kongresejo lokigis en la sidejo de la Societo "Amitié des Aveugles de France", 58 rue Bosquet, en Parizo. Partoprenis 60 delegitoj de 12 nacioj. Dum kaj fine de la Kongreso, la partoprenantoj ekskursis. Unue en la parizan tombejon "Père Lachaise". Ili pilgrimis tien por memorigi tiun, kiu multe faris por plibonigi ilian sorton kaj ili respektplene metis, sur la tombon de Théophile Cart, memorplaton kun la jena surskribaĵo (en la franca lingvo): "Al paĉjeto ilia Théophile Cart, la partoprenantoj de la 11a Kongreso de la Blindaj Esperantistoj. Parizo, 30 julio-6 aŭgusto 1932". Fine de l'kongreso, la dua pilgrimo celis la naskiĝdomon de Louis Braille, en la vilaĝo Coupvray je 40 km for, oriente, de Parizo. Tie ili estis akceptitaj de la urbestro, de la urbkonsilantaro kaj de la loĝantaro. Por memorigi tiun eventon elblankmarmora memorplato estis fiksita sur la soklon de la monumento honore al Louis Braille. La franclingva teksto similas tiun metitan en la tombejo "Père Lachaise", krom la komenco, kiu franclingve diras, en Coupvray: "A leur cher et génial Louis Braille..." kies traduko estas: "Al ilia kara kaj genia Louis Braille..."


Sesdekkvin jaroj forpasis sed tiu memortabulo ankoraŭ ekzistas. Efektiva ZEO ĝi estas, ĉar la teksto inkluzivas la vorton "esperantistoj" kaj do meritas esti envicigita en la francan ZEO-liston.

Unu el la partoprenintoj de la 11a Kongreso povas mem atesti tion. Li estis 19jara en 1932. De tre longe li estas UEA-delegito en la urbo Villeurbanne kaj honora membro de UEA de 1994. Temas pri nia simpatia samideano Raymond Gonin (Vidu "Esperanto" de oktobro 1994, n-ro 1063, paĝo 167).

Koran saluton al li.
Raymond Boré, UEA-delegito.
(Foto de RB)



La alia fakto estas ke povus renversiĝi la perversa mekanismo de la registaraj egoismoj. Dum mi instruis en Parizo (estis la tagoj de Maastricht), oni invitis min al pluraj kunvenoj pri franclingvio: ili frenezis pro la problemo de la [eŭropa] lingvo. Sajne la obsedo de la francoj estis, kiel kutime, la devo agnoski ke la angla fariĝis vehikla lingvo. Mi tamen komprenis ke, kvankam la francoj tion negas, sub tio kaŝiĝas pli forta timo, la timo pri la germana. Post la falo de la berlina muro kaj la malfermiĝo de Orienta Eŭropo la francoj timas, kaj je tiu ĉi punkto ili estus disponeblaj subteni E-on ĉe UN kaj Unesko, por ke la germana ne gajnu. En tiel fragmentita Eŭropo, slovako akceptus engaĝi sin por Eo, se tiel ne gajnus la malbenita lingvo de sia frato bosnia aŭ slovena. Efektive mi devas agnoski ke, unuaforte je en la historio de la homaro, la situacio povus ŝanĝiĝi, povus ekesti fortoj por alfabetigo, disvastigo kaj altrudo de vehikla lingvo. Sola kondiĉo por ke tiu ĉi lingvo daŭre estu sub kontrolo: ĝi restu (ĉetere laŭ la ideo de Zamenhof) vehikla, uzata por multaj internaciaj aktivadoj aŭ por traduki multajn beletraĵojn, sed ĝi ne pretendu esti "la per-fakta lingvo" nek anstataŭi la ekzistantajn idiomojn.



Monumente pri Esperanto

L'ouvrage ainsi intitulé comporte beaucoup de curiosités. Par exemple, un bateau espagnol reçut le nom "Esperanto" dès 1896. Zamenhof avait, dès 1907, de son vivant, la première rue à son nom à Limoges. Très loin dans l'espace, hors du système solaire, la sonde spatiale "Voyager II" porte un message en espéranto prononcé par un anglophone...

Fruit de 30 ans de recherches effectuées par Hugo Röllinger, présenté par Thomas Bormann, illustré par 86 photos, ce livre de 111 pages présente les diverses formes d'hommages rendus à la personnalité et à l'oeuvre du Dr Zamenhof. 1044 rues, places, ponts, monuments, édifices publics, etc. de 54 pays des cinq continents sont ainsi recensés.

Ce livre sera d'une grande utilité pour les personnes qui souhaitent faire des démarches auprès des municipalités afin que soit honorée la mémoire d'un homme que l'UNESCO a célébré en tant que "personnalité importante universellement reconnue dans les domaines de l'éducation, de la science et de la culture".


Rien qu'en France, plusieurs rues ou places ont reçu les noms du Dr Zamenhof ou de l'espéranto après le dépôt du manuscrit chez l'éditeur (UEA), entre autres, Fouquières-lez-Lens, Gravelines et, dernièrement, Laon, où un "Rond-point Zamenhof" sera inauguré vers le 15 décembre, date anniversaire de la naissance de L. L. Zamenhof (15-12-1859).

Autrement dit, ça bouge partout, et de plus en plus vite.

En collaboration avec Raymond Boré (Chambéry), SAT-Amikaro établit une liste remise à jour des "ZEO" (Zamenhof-Esperanto-Objektoj) de France: 138 au 16-05-97. Tirage laser contre 1 FRF + affranchissement 20g auprès de Henri Masson, Le Grand Renaudon, FR-85540 Moutiers les Mauxfaits.

← Umberto Eco
(el Radio Radicale, Romo)

KRUCVORTOJ



1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	
I	P	R	A	K	T	I	K	I	S	T
II	R	O	T	E	R	D	A	M	A	N
III	E	L	E	F	A	N	T	O	S	T
IV	D	A	N	I	N		A	R	A	
V	I	N	D	R		U	S	T	F	O
VI	K	D	O		A	N	T	E	R	
VII	A			S	K	A	R	L	A	T
VIII	T	A	L	I	T	R	O		S	I
IX	I	R	I	D	O		F	J	E	
X	V	A	L	E	R	I	A	N	E	L

Solvoj de la 140-a

Kiom da diferencoj?

En la lasta SFS, tiu demando pri la diferencoj inter la du glumarkoj ne estis respondebla! Fakte okazis, ke la helaj koloroj ne estis presitaj pro la fotokopiado. Sur la nova glumarko (vidu p. 7) la teksto pri la UK estas sur 2 linioj, la vorto esperanto estas pli dika, fine aldoniĝis stelo, do entute estas tri diferencoj.

SFS 142 aperos en Oktobro. Sendu viajn kontribuojn ĝis la 27a de Septembro (dato de la federacia kunveno) al Jean Hénin, Beauregard Rte de Montcauyroux, 48500 La Canourgue Tel/faksilo : 04 66 32 86 36 Anticipan dankon! Agrablajn feriojn!

- HORIZONTALE**
- I) Sonfigur(o).
 - II) Kredodefend(o).
 - III) Plezurege / Nereala bildo.
 - IV) Duontrezor(o) / s : Kapablo / Inform(o).
 - V) 39 / Malmola ero.
 - VI) Monĉambr(o) / ... aŭ ne...
 - VII) s : Nebula afero / Nekompleta rento / s : Movoj.
 - VIII) Dokumentokonfirmo.
 - IX) Kiel tera regno / s : Biblia mezurunuo.
 - X) s : Helico / Rezisti al espiora mano.
- VERTIKALE**
- 1) Aparte apart(a).
 - 2) Loĝej(o).
 - 3) Vesta part(o) / Cerebra elstaraĵ(o).
 - 4) Por kuiraj kuraci, radike / Ĝ(i) povas esti riĉa aŭ malriĉa, vira aŭ ina.
 - 5) Azia dram(o) / Ludofin(o).
 - 6) Gotik(a) / Bele.
 - 7) Apartiga adverbo / Nerekomendita divan(o).
 - 8) Patologia senordeco de la movoj.
 - 9) Antaŭovul(o) / Postovul(o).
 - 10) Tema bildar(o).

s : sone

BOPARO.

LA TOUR DE BABEL

3 mille possibilités de Jeu



Fig. 98